

# ESPERANTO

# INTERNACIA

OFICIALA ORGANO  
DE INTERNACIA  
ESPERANTO-LIGO

Eldonejo kaj Redakcio : Internacia Esperanto-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo

VOL. 10, N-ro 12

DECEMBRO, 1946

---



---

## SIMPLAJ LEGOLIBROJ

**Esperanto por Infanoj.** G. GLADSTONE SOLOMON.

Ilustrita. Broŝurita 70 paĝoj.

Prezo 1 ŝil. 11 pencoj afrankite (8 rpk.)

**Johano kaj Silvio.** F. F. BETTS.

Broŝurita 48 paĝoj.

Prezo 1 ŝil. 2 pencoj afrankite (5 rpk.)

**Tejo kaj Ĉerik.** H. G. TOMS.

Broŝurita 48 paĝoj.

Prezo 1 ŝil. 8 pencoj afrankite (7 rpk.)

---

*Eldonitaj de*

**THE ESPERANTO PUBLISHING CO. LTD.**

*Mendu ĉe*

**INTERNACIA ESPERANTO-LIGO**

**Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo**

---



---

# ANONCETOJ

*Kosto : du pencej por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkuponon por ĉiuj du vortoj.*

**Letervesperon** aranĝas la Reading Esperanto-Societo je la 29a Januaro 1947. Ni respondos al ĉiu sendita saluto. Bonvole sendu poŝtkartojn aŭ leterojn al F-ino Lawton, 22 Tamarisk Avenue, Reading, Berks., Anglujo.

**Por instruo** en elementaj lernejoj kaj eldono de lernejliretoj pri geografio mi bezonas fidindajn informojn pri geografio, vivrimedoj, industrio, moroj, kaj religio el ĉiuj landoj. Mi reciprokos per informoj pri Nederlando. Skribu al G. Luinge, Wagnersingel 22, Groningen, Nederlando.

**Norwicha Esperanta Rondo.** Leter- kaj gazet-vespero, 7 Jan. 1947. Ne pre respondos. 11 Chapel Field North, Norwich, Norfolk, Anglujo.

**Urĝas.** 50 kursanoj kaj aliaj membroj de klubo serĉas plej diverslandajn gekorespondantojn. Skribu grandmase al Frant. Pytloŭn, en Hradec Králové II, str. D-ro Zamenhof 1010, Ĉeĥoslovakujo.

**Mi sopiras** je belaj ilustritaj kartoj kaj poŝtmarkoj el la tuta mondo. Mi respondos certe: Rudolf Profous, oficisto, tr. mar. Koneva 80, Melník III, Ĉeĥoslovakujo.

**Brita oficiro deziras** korespondi kun geislamanoj. J. Cameron, Lloyds Bank, Wolverhampton, Anglujo.

**Instruistoj!** Helpu enkonduki Esperanton en la lernejojn per komuna korespondado. Skribu unue al Prof-ino Clelia Cordero, Viale Settimio Severo 27, Torino, Italujo, kiu garantias respondon.

**Ekskluzivajn reprezentadojn** pri komercaj produktaĵoj, sed precipe porvirinaj punktoj, brodaĵoj, valenciennes, k.t.p., akceptas S-ino F. Guzmán Plá, Gran Vía de Fernando el Católico 25, Valencia, Hispanujo.

**Vendisto de bicikloj** deziras reprezentadon de anglaj bicikloj kaj akcesoraĵoj. Skribu al S-ro José Sales, Plaza de Tetuan 40, Castellon de la Plana, Hispanujo.

**Deziras korespondi** kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj kaj interŝanĝi poŝtkartojn D-ro Giuseppe Zappulla, Via Alloro, Buccheri (Siracusa), Italujo.

**Juna Aŭstro** dez. interŝanĝi il. p. kaj pm., ankaŭ serĉas aĉetantojn por stiriaj artmetiaĵoj. Heinz Halik, St. Pölten-Spratzern, A. Hackerstrasse 63, N. Österreich, Aŭstrujo.

**Deziras korespondi** kun ĉiuj landoj Ray Burrows, Lyell Road, Queenstown, Tasmania, Aŭstralio.

**Lernanto** (17-jara) deziras korespondi kun francaj, danaj, aŭ germanaj gejunuloj. Adreso: I. R. Macnair, Southridge, Streatley, Berks., Anglujo.

**Hungaraj geesperantistoj** ŝatus denove korespondi kun Esperantistoj en la tuta mondo, letere aŭ p.i. Hungaraj gestudentoj (universitatoj, ĉeflernejoj, kaj lernejoj) ŝatus korespondi esperante, angle, france, aŭ germane. Skribu unue al S-ro Gustav Kovacs, Budapest VIII, Ullői ut. 20, Hungarujo.

**Interŝanĝos tutmonde** porinfanojn lernolibrojn ilustritajn. Skribu unue. Profesoro Beau, 21a Bd. Faidherbe, Marseille, Francujo.

**Tri Francaj Esperantistaj skoltoj** deziras korespondi kun alilandaj skoltoj partoprenontaj al la venontjara jamboreo en Francujo. Skribu al O. Lemichez, Don (Nord), Francujo.

**Ĉu mi trovos amikojn** tutmonde? Certe respondos. Josef Vesely, Staňkov 165, Ĉeĥoslovakujo.

**Framasonoj ĉiulandaj** turnu vin al Loĝio Esperantista G.L.D.F., 8 rue de Puteaux, Paris XVII, Francujo.

**Norda Stelo** aranĝos letervesperon en marto 1947. Skribu grandnombre. Responde garantiata. Adreso: Koninginelaan 18, Blakenberge, Belgujo.

**S-ano Henriko Michálek**, Londynská 17, Liberec-Ruzodol I, Ĉeĥoslovakujo deziras korespondi pri senco kaj celo de la vivo, homa perfektigo, vojo de la homaro, interŝanĝas ĉiajn Esp. propagandilojn.

**Kun gesamideanoj** el la tuta mondo deziras korespondi per ilustritaj poŝtkartoj Mirek Emer, studento, Karlovy Vary, Zahradni 41, Ĉeĥoslovakujo.

**La Societo de Britaj Esperantistaj Geinstruistoj** aranĝas studsemajnon ĉe Bridlington, Yorkshire, Aprilo 5-12, 1947. Nur por lernejaj geinstruistoj. Detaloj (kontraŭ respondkuponon) de F-ino V. C. Nixon, 183 Woodlands Park Road, Birmingham 30, Anglujo.

**Tutmonda Katolika Adresaro, 1947.** Enskribo kaj ekzemplero, du respondkuponoj. Limdato: 20 Decembro 1946. Lorcán Ó hUiginn, Dúndroma-Dublin, Irlando.

# ESPERANTO INTERNACIA

OFICIALA ORGANO  
DE INTERNACIA  
ESPERANTO-LIGO

Eldonejo kaj Redakcio: Internacia Esperanto-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo

VOL. 10, N-RO 12

DECEMBRO, 1946

## RETROSPEKTIVO

Jam estas tradicie fari en la jarfino kontrolon de la pozitivaj, kaj ni opinias, ke estas prudente kvazaŭ halti momenton en ĉi tiu jarfina momento por resumi la progreson faritan kaj por taksu objektivane nian staton.

Rilate nian Ligon la plej elstara fakto estas la vere mirinda kresko de la membraro. I.E.L. nun estas la plej forta Esperantista organizaĵo en la mondo. Malgraŭ ĉiuj kritikoj—kaj ili ja ne mankas—la fakto restas, ke la Esperantistoj en ĉiuj lokoj daŭre aliĝas al ni. Mi provis analizi la kaŭzon de tio kaj mi venis al la konkludo, ke la ĉefa faktoro estas la prudenta administrado de nia organizaĵo dum la pasintaj dek jaroj. En la nuna tempo la nomo I.E.L. staras kiel sinonimo por fidiindeco, honesta traktado, justeco kaj demokratio. Netaksebla estas la kontribuo, kiun I.E.L. faris al la Esperanta afero dum tiuj malfacilaj jaroj.

La intertraktadoj nun okazantaj inter I.E.L. kaj U.E.A. donas al ni kaŭzon esperi, ke en la baldaŭna estonteco la ĝis nun dividitaj fortoj de la neŭtrala movado fariĝos unu potenca pelforto por la sukcesigo de nia afero. Supozeble estas vane esperi, ke la tuta Esperantistaro sin unuigos, ĉar tiom da diversaj kredoj kaj opinioj dividas la homojn. Ŝajnas al mi tamen, tre dezirinde, ke la diversaj Esperantistaj instancoj almenaŭ faru inter si interkonsentojn pri kunlaboro pri aferoj komune interesaj. La fakaj kaj tendencaj organizaĵoj tute ne kompromitus sin, sed kontraŭe aldonus al sia prestiĝo kaj al sia forto. Ni esperu, ke la lecionoj de la ĵus pasintaj jaroj estas lernitaj.

Versajne la Petskribo, unika de sia speco, okupos altan lokon en la taksoj de la historiistoj de la estonteco. La iniciato de I.E.L. kaptis la imagon de la tutmondaj gesamideanoj, kiuj bone kunlaboras por sukcesigi tiun gravan demonstracion de nia volo al oficiala rekono. Malgraŭ esprimitaj duboj, kaj spite aktivan kontraŭ-

staron en iuj lokoj, la kampanjo alportis gravajn sukcesojn, kaj en la nuna numero ni donas al niaj legantoj kaj al la mondo la unuajn detalojn de nia agado ĉe la tutmondaj oficialaj instancoj.

Pri nia gazeto mi kredas, ke niaj membroj rajtas fieri, ke ilia organo staras en la unua rango inter la Esperantistaj periodaĵoj. Ĝi jam akiris reputacion kiel fonto de bone informita, fakta kaj objektiva novaĵo pri la movado ĝenerale. Opinioj esprimitaj de kompetentuloj konfirmas nian kredon, ke *Esperanto Internacia* estas unu el la plej bone redaktataj gazetoj en la Esperanta gazetaro. Tio estas grava ne nur de vidpunkto de bona ĵurnalismo, sed ankaŭ de tiu vidpunkto, ke por miloj da Esperantistoj nia gazeto estas gvido al bona kaj ĝusta uzado de Esperanto. Nia rezigno pri ĉia eksperimentado kaj plikomplikado de la lingvo povas havi nur bonan rezultaton ĉe la ordinara nivelo de Esperanto-uzado.

Krom doni aktualajn informojn pri la movado, la gazeto ankaŭ servis utilan funkcion per presigo de neesperantistaj novaĵoj, kaj ni memoras kun kontento, ke nia artikolo pri la Atoma Bombo, kiu aperis en la Januaro numero, estis por multaj homoj la unua detala kaj fidinda sciigo pri tiu eltrovo kaj ties efikoj.

En la sfero de la literaturo ni sentis niajn limigojn kaj domaĝis la katenojn de la paperporcio. Ek de Januaro *Esperanto Internacia* havos novan formaton kaj estas espereble, ke iom post iom ni povos disponi eĉ pli da papero, kio donos al ni okazon kontentigi la dezirojn de niaj membroj en tiu rilato.

Resume do ni povas esti tre kontentaj, ke en la fino de ĉi tiu unua kompleta jaro post la milito, nia organizaĵo staras sur firma fundamento, ideoj, morale kaj ekonomie, kaj ni povas kun espero kaj fido nin turni al la nova jaro kaj fronti al la novaj problemoj kaj taskoj, kiuj certe nin okupos. Do adiaŭ 1946; saluton 1947!

M.S.

# ESPERANTO KAJ UNESKO

Dum kelkaj monatoj la provizora sidejo de la Eduka, Scienca kaj Kultura Organizaĵo de la Unuigitaj Nacioj troviĝis en Londono. (En la cetero de ĉi tiu raporto ni uzos la nomon UNESKO, la oficiale akceptita mallongigo laŭ la komenc-literoj de la Angla nomo de tiu organizaĵo). En Majo 1946 la Internacia Esperanto-Ligo starigis kontakton kun tiu organizaĵo pere de la Brita Esperantista Asocio. Multe da informza materialo estis prezentata, kaj okazis intervjuo.

En la fino de Septembro UNESKO translokiĝis al sia konstanta sidejo en Parizo. Post perkoresponda prezento de novaj faktoj, S-ro E. D. Durrant vizitis Parizon nome de I.E.L. kaj estis akceptata ĉe UNESKO de D-ro Awad, Estro de la Fako pri Sociaj Sciencoj, kiam pli da faktoj estis prezentataj kaj diversaj flankoj de la Esperanta movado estis diskutataj. La sekvanta estas traduko de la teksto Angla-lingve interkonsentita la 24an de Oktobro, kiel deklaro pri la fakta sinteno de UNESKO rilate al la internacia helpeltingva demando kaj la Esperanto-movado:—

“Estas kompreneble, ke estas en la intereso de UNESKO fari pristudon pri ĉiuj klopodoj, kiuj celas al la enkonduko de internacia helpeltingvo.

“Ĉi-tiurilate UNESKO prezentas en la nuna tempo, kaj verŝajne prezentos dum kelka tempo, neŭtralan sintenon koncerne ĉi tiujn klopodojn.

“La Internacia Esperanto-Ligo, nome de siaj kunlaborantaj organizaĵoj ĉiuj-specaj, estas informanta UNESKO-n pri la internacia petskribo por Esperanto, kaj jam prezentis preparan informaron. Ĝi daŭre kunlaboros ĝis sia povo por helpi al UNESKO havigi al si ĉiajn informojn rilate al Esperanto, kaj tion faros en tuta kunlaboro kun ĉiuj Esperantaj organizaĵoj, pro kiuj ĝi havas rajton paroli.

“Ĉi tio neniel malhelpos al kiu ajn Esperanta organizaĵo, kiu mem preferos prezenti rilatajn faktojn en sia propra nomo, sendepende de la kialoj, kiuj eble decidigos ĝin tiel agi.”

UNESKO estos regule informata interalie pri la progreso de la Petskribo ĝis ĝia fina prezento en komune taŭga momento. Intertempe ĉi tiu novaĵo estu instigo al ĉiuj Esperantistoj eĉ pli intensigi siajn klopodojn kolekti subskribojn. Estas aparte dezirinde, ke oni ricevu la apogon de eksteraj organizaĵoj per alprenado de rezolucioj laŭ la teksto de la petskribo aŭ en simila senco. Se oni sukcesos en tio, oni estas urĝe petata sendi plenan

raporton kun ĝusta traduko de la rezolucio, se ties teksto ne estas la sama kiel en la petskribo.

Oni sendu la informojn rekte al S-ro E. D. Durrant, 18 Romeyn Road, London, S.W.16, Anglujo, kiu respondecas pri la kolektado de informaro laŭ interkonsentita sistemo por posta prezento al UNESKO.

C. C. Goldsmith,  
Sekretario de I.E.L.

## LA PETSKRIBO

Jen la ciferoj kontrolitaj ĝis 5a de Novembro:

Landoj	
Argentino .. 1455	Islando .. 3775
Aŭstralio .. 2220	Italujo .. 2203
Aŭstrujo .. 51	Jugoslavujo .. 9236
Belujo .. 4396	Kanado .. 241
Brazilo .. 4129	Maroko .. 956
Britujo .. 17733	Nederlando .. 36964
Bulgaraĵo .. 20557	Norvegujo .. 10082
Ĉeĥoslovakujo 11773	Nov-Zelando 2200
Danujo .. 3778	Palestino .. 393
Egiptujo .. 1412	Polujo .. 14
Finnujo .. 6297	Portugalujo .. 3115
Franco .. 9728	Svedujo .. 15424
Germanujo .. 2611	Svisujo .. 911
Grekujo .. 473	Usono .. 3948
Hindujo .. 54	Ceteraj Lokoj 310
Hungaraĵo .. 2761	
Irlando .. 216	sumo 179416

Okupoj	
Artistoj .. 975	Navigaciistoj 640
Delegitoj	Parlamentanoj 93
Komunumaj 209	Policistoj .. 1165
Dentistoj .. 275	Presistoj .. 1856
Desegnistoj .. 968	P.T.T.-istoj .. 4042
Dommastrinoj 26107	Religiistoj .. 895
Edukaj	Sciencistoj .. 666
Aŭtoritatuloj 567	Sindikateĉefoj 230
Elektristoj .. 1344	Soldatoj .. 2173
Farmaciistoj 615	Studentoj .. 15024
Farmistoj .. 6334	Ŝoforoj .. 1322
Hotelistoj .. 765	Ŝtatoficistoj .. 4471
Inĝenieroj .. 6379	Tekstistoj .. 857
Instruistoj .. 9990	Transportistoj 7926
Juristoj .. 812	Urboficistoj .. 1928
Ĵurnalistoj .. 600	Vendistoj .. 5681
Komercistoj .. 30720	Vestistoj .. 2711
Konstruistoj 3317	Diversaj .. 9896
Kuracistoj .. 2534	
Laboristoj .. 11312	sumo 179416
Lingvistoj .. 151	
Metiistoj	
Diversaj .. 13866	

# RAPORTOJ PRI LA MOVADO

## FINNLANDO

Versajne la unuan fojon en la historio de la Finna lernejo okazis, ke la lerneja administranto proponis Esperanton kiel devigan fakon en sia lernejo. Tion faris ĉi-aŭtune la administranto de la geknaba liceo en Somero. La liceo estas 8-klasa kaj ĝi preparas siajn lernantojn ĝis altlernejaj studoj. Ĉi-jare en la lernejo troviĝas 246 gelnantoj. La administranto unuanime decidis, ke Esperanto estu instruata devige per 2 lecionoj ĉiusemajne en la unua klaso (do por 10-12-jaruloj).

La administranto de la publika instruado tamen "... ne povis aprobi lecionoplanon, en kiu Esperanto estas deviga fako." Tial Esperanto estis akceptata nur kiel libervola fako.

En la libervolaj Esperanto-lecionoj partoprenas 35 knaboj el 41 lernantoj de la unua klaso. Oni menciis, ke ili samtempe komencis lernadon de la Sveda lingvo, kiu en niaj lernejoj estas unua fremda lingvo. La instruisto de la Esperanto-lecionoj estas la rektoro de la liceo, S-ro Joel Vilkki.

Se en aliaj landoj ekzistas samnivelaj Esperanto-kursoj mi proponas, ke ili komencu korespondadon kun tiu en Somero (adreso: La unua klaso, Yhteiskoulu, Somero, Finnujo). Komence la korespondado povos esti kolektiva, sed poste individua. Ni do atendas salutojn kaj korespondproponojn el la tuta mondo.

En la sama lernejo okazas ankoraŭ du kursoj de Esperanto, unu por komencantoj de pli superaj klasoj (12-19-jaruloj) kun 25 partoprenantoj; kaj dua daŭriga kurso kun 15 partoprenantoj, inter ili 4 instruistoj de la lernejo. Ankaŭ ĉi tiuj kursanoj atendas salutojn kaj korespondantojn.

J.V.

## GERMANUJO

Post insistaj klopodoj fare de la Münchenaj Esperantistoj, la Bavara ŝtatministerio por edukado kaj kulturo allasis la enkondukon de Esperanto en ĉiuj altlernejoj en Bavarujo. La nomita grupo disponigas la instruistojn el siaj 650 membroj!

La fervoja direkto por Sud-Germanujo esprimis la intencan enkonduki Esperanton kiel devigan temon en ĉiuj -faklernejoj fervojistaj.

Radio München certigis, ke dum duonjaro oni dissendos Esperanton dufoje en ĉiu semajno. Detaloj ankoraŭ ne estas haveblaj.

En München oni presigis 20,000 deklarfoliojn por la Petskrubo.

En Universitato München, 18an de Aŭgusto, la grupo "Laboro" aranĝis manifeston. Inter la 250 ĉeestantoj troviĝis delegitoj el multaj Sud-Germanaj urboj, inter ili Usonanoj, Francoj, Ukrainanoj, Litovoj kaj unu Argentinano. Preleganto estis eksprezidanto de Esperanto-grupo de Nov-Yorko, James Sayers, kaj la temo *Unu Mondo*. Resumo de lia prelego estis farata Germanlingve.

S.Z.

## HUNGARUJO

La nombro de parlamentaj oficistoj, kiuj studas Esperanton, estas 80. Tri kursoj, unu el ili progresinta, funkcias en la parlamentejo. Ĉe la parlamentejoj mem ekzistas granda simpatio por Esperanto, kaj pluraj anoj jam parolas nian lingvon. La laborantoj sur tiu kampo deziras krei fortan poresperantan volon tiel, ke en taŭga tempo la oficialaj instancoj donos sian sankcion al la lingvo. Oni tre deziras, ke ankaŭ en aliaj landoj oni simile agu, kaj eventuale interesi la Interparlamentanan Union pri Esperanto. La Hungaroj jam faris komencajn paŝojn en tiu direkto kun iomete da sukceso, kaj esperas fondi Esperantan Sekcion en la kadro de I.U.

La 28an de Aŭgusto Parlamentano Stefan Csurgai faris al la ministro por Edukado interpelacion pri Esperanto. La apelacio trovis aprobon en ĉiuj flankoj de la parlamento kaj aŭdiĝis ĝenerala aplaŭdo, kiam S-ro Csurgai aludis pri la grava rolo de Esperanto por malgrandaj popoloj.

Pere de registara subteno, la nomita parlamentano, S-ro Csurgai, vojaĝis komence de Septembro en Nederlando por partopreni la Esperanto-kongreson en Utrecht. Dum sia vizito li interrilatis, interalie, kun Nederlandaj politikistoj, kiuj simpatias kun Esperanto.

el Hungara Esperantisto

## JAPANUJO

Zikeikai Medicina Universitato, Tokio, enkondukis Esperanton kiel la trian fremdlingvon en oficiala kurso, kaj 300 studentoj lernas ĝin sub gvido de Prof. K. Inoue.

La 33a Japana Kongreso de Esperanto okazis en la 23a de Junio en la lekcicambro de Literatura Fakultato de Tokia Imperia Universitato kun partopreno de 85 delegitoj. Krome 45 studentoj neesperantistaj aŭskultis paroladojn, inter ili *Scienco kaj Internacia Lingvo* de D-ro H. Oka, profesoro de Eduka Universitato Tokio, kaj *Kiel rigardas*

*artefaritan lingvon unu lingvisto* de S-ro H. Kobayasi, eksvicprofesoro de Imperia Universitato Keizyō.

La Japana Esperanto-movado estis gvidata de Japana Esperanto-Instituto, sed ĉar ĝia neŭtraleco estas iom neoportuna por elvolvi viglan movadon en la nova epoko, la 32a Kongreso, Decembro 1945, decidis fondi novan asocion, kiu paralele kun JEI laboros por akiri pli vastan popolamason al nia afero, kaj laŭ tiu rezolucio oni fondis Japanan Esperanto-Asocion okaze de la 33a Kongreso. La Asocio provizore sidas ĉe la adreso de JEI. La ĉefaj grupoj, ekz. Tokio Esperanto-Societo, Osaka Esperanto-Societo, Nagoja Esperanto-Societo, Fukuoka Esperanto-Societo k.a. deklaris sian aliĝon al JEA.

La Japana Brodkaŝta Korporacio (N.H.K.) dissendis la 31an de Aŭgusto en sia *Horeto por respondoj al la aŭskultantoj* paroladon de S. Mijake, ĝenerala sekretario de JEI, pri Esperanto. La parolado varbis 100 novajn samideanojn.

Fama parlamentano, S-ro Yukio Osaki, la plej respektata politikisto en Japanujo, iama ministro por Edukado, aŭskultis la supre cititan paroladon kaj invitis S-ron Mijake al sia loĝejo en Jokosuka. S-ro Osaki estas 89-jara, kaj seninterrompe elektigis en la parlamenton jam de ĝia inaŭguro en 1880, la plej longedaŭra reprezentado en la mondo. S-ro Mijake vizitis lin 10an de Septembro kune kun direktoroj de JEI, prof. Hasegawa kaj S-ro M. Inoue. S-ro Osaki, kiu delonge estas favora al nia movado demandis pri diversaj aferoj kaj esprimis sian elkoran simpatian al nia movado.

Al Japanoj ankoraŭ ne estas permesite korespondi kun la eksterlando, sed oni atendas baldaŭan nuligon de la malpermeso. Tiuj, kiuj deziras korespondi kun Japanoj, skribu al la Japana Esperanto-Instituto, Hongo-Motomati, Tokio (kiam la korespondado estos permesita).

*Mark Starr*

*(sekve de vizito al Japanujo)*

## Radio

Ni ricevis informon, ke oni faris ŝanĝon pri la dissendoj el Ostrava, Ĉeĥoslovakujo. De nun Moravska Ostrava dissendos regule marde kaj vendrede Esperantajn prelegojn pri la vivo en tiu lando, pri Esperanto k.t.p. La dissendoj okazos je 22.50 laŭ normala mezeŭropa tempo (dekalkulu unu horon laŭ Brita tempo) per ondolongo 325 metroj, 922 kilocikloj.

**Libropremio.** Skribu al la ĉi-supra stacio pri (a) Kion vi opinias pri Ĉeĥoslovakujo? (b) Kio vin interesas el la nova vivo en Ĉeĥoslovaka Respubliko? Ne skribu longan

leteron, sed skribu sincere. Oni donas libro-premion al la sendinto de la plej interesa letero.

Adreso por leteroj estas: Radiostacio, Ostrava, Ĉeĥoslovakujo.

## Skoltoj

La nova monata revuo de la Slovakaj geskoltoj *Slovensky Junák* havas en ĉiu sia numero Esperanto-paĝon redaktatan de nia fervora lupidestro Lad. Ozábal. Du kolonoj de la Esperanto-paĝo enhavas kurson, kaj la tria informas pri novaĵoj en la Esperantista-Skoltoista movado.

Helpu nin per absendo de multaj tiaj novaĵoj el ĉiuj anguloj de la mondo. Adreso: Redakcio de Slovensky Junák, Dunajská 47/a, Bratislava, Ĉeĥoslovakujo  
*Maljuna Urso*

## Studentoj

*Popola Studenta Junularo*, oficiala organizaĵo de Jugoslava studentaro, volonte korespondas Esperanto-lingve kun studentoj, ĉu unuope, ĉu are, pri studentaj, fakaj, organizaj kaj aliaj problemoj. La Esperanto-sekcio de Kroata Esperanto-Ligo disponigas la tradukantojn. Estas nepre necese kulturi ĉi tiun kampon de Esperanto-uzado kaj oni petas, ke ĉie en la mondo studentoj kunlaboru. La adreso estas Narodna studentska omladina, Zagreb, Studentski dom, Jugoslavujo.

## Militkaptito Propagandas

La 28an de Septembro 1946, militkaptito Rosner en Aliko, Grekujo, faris propagandan paroladon por Esperanto, kaj aranĝis ekspozicion de materialo sendita al li el diversaj fontoj inkluzive de I.E.L.

La sekvantan semajnon la nomita samideano malfermis kurson, kiun partoprenas malgranda anaro.

## La Praktika Utilo de Esperanto

D-ro Lehman Wendell en Usono raportas, ke en 1945 li ricevis leteron de Prof. D-ro G. Canuto, Dekano de Medicina Fakultato de la Universitato Parma, Italujo, en kiu tiu lasta petis malgrandan resumon de grava artikolo, pri kiu li ricevis informon. La artikolo traktis pri Adenokarcenomo de la Galtuboj kaj estis verkita anglalingve de D-roj W. Walters kaj P. F. Olsen, kuracistoj en la mond fama Kliniko Mayo en Rochester, Minnesota, Usono.

Anstataŭ fari resumon, D-ro Wendell tradukis la tutan artikolon, kopiis la ilustraĵojn per sia fotografilo kaj sendis ĉion al Italujo. La tasko estis malfacila ĉar D-ro Wendell ne estas medicin-kuracisto, sed dentisto.



Tamen, D-ro Canuto poste raportis, ke la traduko estis perfekta kaj la studentoj kaj membroj de la fakultato tre miris pri tio, ke oni povas tiel uzi Esperanton. Kompreneble la propaganda valoro de tia laboro estas granda.

### Esperanta Infan-Kolonio


Dum Aŭgusto-Septembro 1946 okazis en L'Arbresle, Francujo, Infankolonio aranĝita de S-ro Duthel. Ĝin partoprenis Francaj geknaboj, Anglaj knaboj kun sia instruisto S-ro K. Sly, kaj unu Nederlanda knabo. Ni publikigas fotografajon de la partoprenantoj kaj organizantoj.

lingvon aŭ la enlandan. Alie la ne-Esperantistoj ne rimarkos la disvastiĝon de la internacia lingvo. Krome, eĉ kiam oni uzas tiun duan lingvon, oni esprimu en ĝi preferon paroli kun Esperantisto, se tiu estas disponebla, kaj tiel oni sugestias tion, ke oni pli facile interkomprenas per Esperanto.

### Esperanta Festo-tago

La sekcio "Haarlemo" de la Nederlanda Esperantista Unuiĝo "L.E.E.N." faras jenan proponon:

Oni esploru la eblecon aranĝi ĉiujaran kaj internacian ĝeneralan Esperanto-tagon.



### La Leganto Parolas

S-ro C. M. Cather, Egiptujo, skribas: Tre bonvena estis la artikolo de H. Bakker en la Septembra numero. Mia sperto indikis, ke oni povas kun plenfido uzi Esperanton por seriozaj skribaj interrilatoj kun kiu ajn grandentreprene. La respondo ne ĉiufoje estas en Esperanto, sed ĉiam montras, ke la uzo de Esperanto estas akceptata kiel afero komprenebla kaj ne rimarkinda.

S-ro H. W. Alings, Nederlando, skribas (ankaŭ pri la supre aludita artikolo): Kiel samurbano de S-ro Bakker, mi povas atesti, ke la situacio ĉe ni estas tiel, kiel li skribis. . . . Mi petas, ke vi avertu viajn legantojn, ke ili en eksterlando precipe kaj unue uzu Esperanton, anstataŭ klopodi per sia propra lingvo. Nur kiam oni ne sukcesas per Esperanto, oni uzu aŭ la gepatran

Kompare malmultaj samideanoj povas viziti la kongresojn, kaj ĝuste tia tago estus bona por montri al la mondo, ke Esperanto ekzistas. En tia festotago ĉiu Esperantisto povus partopreni. La grava afero estas, ke la tago estu akceptata de ĉiulandaj Esperantistoj por ebligi tutmondan demonstracion de Esperanto. Sekve, tago en somero estus plej taŭga. La Zamenhofa Tago, ĝuste pro tio, ke ĝi okazas en la vintro, ne estas taŭga por nia celo.

Oni proponas la 7an de Aŭgusto ĉar tiu dato memorigas la komencan tagon de la Bulonja Kongreso. Kion opinias niaj legantoj?

**BONVOLU FRUE PAGI VIAN  
KOTIZON**

# 32a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Bern, Svisujo. 26 Julio-2a Aŭgusto, 1947

Adreso por ĉiuj komunikadoj, Bundesgasse 20, Bern.

Denove okazos la Universala Kongreso de Esperanto en la plej vigla turist-sezono. Post la milito Svislando estas preferata celo por la alilandata publiko kaj malgraŭ, ke la alveno al Svislando estis tre granda en la somero 1946, oni povas esti certa, ke la alveno en la venonta somero estos pli granda.

Komprenoble tio donas al la organizantoj de la 32-a Universala Kongreso de Esperanto en Berno trege malfacilan taskon. Pro tio, estos necese rezervi al ni ne nur hotelĉambrojn kaj restadon en ĉambroj de privatuloj, sed ankaŭ en lernejoj kaj kazernoj. Sekve oni devos kalkuli je ia amasa restado, sed ĉiu persono ricevos propran liton en tia restejo.

Rilate la nutradon ekzistas ankaŭ la samaj malfacilaĵoj. Pro tio la Loka Kongresa Komitato devis, nevolonte, fiksi la aranĝon de la restado kaj la nutrado kune por la tuta tempo de la 26-a de Julio vespere ĝis la 2-a de Aŭgusto posttagmeze. La aranĝo konsistas do jene: ĉambro, matenmanĝo, tagmanĝo, vespermanĝo kaj trinkmono, kaj ĉe hoteloj ankaŭ transporto de la pakajoj.

## A. Hotelĉambroj :

Ekzistas nur tre malmultaj ĉambroj je nia dispono. Tiuj estos dividitaj en 3 kategoriojn :

Kategorio I.—

Luksa klaso, por 8 tagoj Sv. fr. 205

Kategorio II.—

Komforta klaso, por 8 tagoj „ „ 155

Kategorio III.—

Modesta klaso, por 8 tagoj „ „ 130

Ni petas, ke tiuj kiuj deziras loĝi en hotelo, kie ili komprenoble ricevos pli da agrableco kaj komforto ol en ĉambroj ĉe privatuloj, sendu al ni kiel eble plej baldaŭ la konvenan mendon kaj zorgu ankaŭ, ke la konforma monsumo estos transpagita en Svisaj frankoj al nia konto ĉe la Schweiz. Volksbank en Berno.

Ni ripetas, ke estos al ni eble disponigi hotelĉambrojn nur je limigita grado kaj nur al tiuj, kiuj plej frutempe mendos kaj antaŭpagos.

## B. Ĉambroj ĉe privatuloj :

Krom la hotelĉambroj ni disponas pri kelkaj centoj da ĉambroj ĉe privatuloj. Ankaŭ tiurilate ni estas devigataj fari kolektivan prezon, kiu valoras por 8 tagoj. En tiu prezo estas enkalkulitaj: ĉambro, maten-, tag-, kaj vesper-manĝo. Multaj

tre bonaj restoracioj estos je la dispono laŭ deziro kaj elekto.

La prezo en tiu aranĝo estos Sv. fr. 120.

## C. Amas-restado :

Ĉe nia dispono estos pluraj centoj da litoj en lernejoj kaj kazernoj. Rilate la nutradon, troviĝos du solvoj :

*Kategorio I.*—Restejo kiel skribita, kun servado kaj nutrado en bona Berna restoracio laŭ propra elekto (maten-, tagkaj vesper-manĝo). Tuta prezo Sv. fr. 110

*Kategorio II.*—La sama kiel supre rilata la restejo, sed pli modesta nutrado troviĝos en similaj restoracioj. Tuta prezo Sv. fr. 85.

Ni devas atentigi, ke ne nur por la privataj ĉambroj, sed ankaŭ por la amas-restado, la baldaŭa mendo estas tre necesa kaj la samtempa pago de la tuta monsumo al iu banko por la konto de la 32-a Universala Kongreso de Esperanto 1947 en Berno per la Schweiz. Volksbank en Berno.

Ni povas garantiĝi nur pri tiu restado dezirata de la kongresano, kiu sekvas niajn instrukciojn. Ni petas vin kiel eble plej frutempe decidi vin pri la aliĝo, ĉar en multaj landoj ekzistas deviz-malfacilaĵoj, kaj pro tio klopodu havigi al vi tuj la necesajn deviz-permesojn, se tio estos necesa en via lando.

**Tendkampo :** Ĉe Bern troviĝas bela kaj bona tendkampo, nur 2 km. de la Kongresejo, en Eichholz. Por eksterlandanoj ĝi estas tute senpaga. Eble troviĝos kelkaj tendoj por tiuj, kiuj ne povos kunporti tendon. Luprezos Sv. fr. 1 por ĉiu nokto.

## Dua Listo de Kongresanoj

103. J. Vondroušek, Brno, Ĉeĥoslovakujo
104. F-ino A. T. Selonen, Norrköping, Svedujo
105. F-ino N. M. E. Farley, Bristol, Britujo
106. F-ino R. M. Spencer, Halifax, Britujo
107. F-ino E. M. Robertson, Halifax, Britujo
108. C. W. Gardner, Sheffield, Britujo
109. S-ino M. I. Gardner, Sheffield, Britujo
110. F. Parker, Burnley, Britujo
111. S-ino E. Parker, Burnley, Britujo
112. F. Murphy, Northendon, Britujo
113. S-ino G. E. Walmsley, Bradford, Britujo
114. J. T. Walmsley, Bradford, Britujo
115. F-ino Beatrice Hoyle, Southport, Britujo



116. F-ino Bertha Hoyle, Southport, Britujo  
 117. F-ino J. Baird, Edinburgh, Skotlando  
 118. I. Williams, Manchester, Britujo  
 119. S-ino H. M. Williams, Manchester, Britujo  
 120. S. E. Shaffer, Manchester, Britujo  
 121. F-ino J. M. F. Marshall, Dumbarton, Skotlando  
 122. H. W. Allen-Smith, Watford, Britujo  
 123. S-ino E. M. Allen-Smith, Watford, Britujo  
 124. F-ino G. F. Allen-Smith, Watford, Britujo  
 125. W. P. Merrick, Shepperton, Britujo  
 126. S-ino M. C. Merrick, Shepperton, Britujo  
 127. Teo Jung, Scheveningen, Nederlando  
 128. S. Ackers, Rotherham, Britujo  
 129. S-ino E. Ackers, Rotherham, Britujo  
 130. J. A. Saldanha Carreira, Lisboa, Portugalujo  
 131. J. Nicholson, Bolton, Britujo  
 132. F-ino M. Nuttall, Southport, Britujo  
 133. F-ino E. M. Walker, Birmingham, Britujo  
 134. F-ino B. M. Chipperfield, London, Britujo  
 135. Ó. S. Magnússon, Reykjavík, Islando  
 136. H. Gudmundsson, Reykjavík, Islando  
 137. D-ro E. Privat, Neuchatel, Svisujo  
 138. S-ino Y. Privat, Neuchatel, Svisujo  
 139. S-ino L. Riedle, Zürich, Svisujo  
 140. A. Schweizer, Zürich-Höngg, Svisujo  
 141. S-ino E. Schweizer-Bachmann, Zürich-Höngg, Svisujo  
 142. K. E. H. Carlén, Hällabrottet, Svedujo  
 143. S-ino H. C. Carlén, Hällabrottet, Svedujo  
 144. F-ino J. D. Ramsay, Kirkcaldy, Skotlando  
 145. M. Stuttard, Amersham, Britujo  
 146. S-ino M. A. Stuttard, Amersham, Britujo  
 147. G. H. Burdikin, St. Helens, Britujo  
 148. F-ino E. Harrison, Bolton, Britujo  
 149. F-ino F. Scholes, Bolton, Britujo  
 150. F-ino N. Bailey, Bolton, Britujo  
 151. F-ino J. Haslam, Bolton, Britujo  
 152. A. Catterall, Bolton, Britujo  
 153. S-ino R. Seddon, Southport, Britujo  
 154. F-ino C. M. Glennie, Birmingham, Britujo  
 155. F. C. Midas, London, Britujo  
 156. S-ino E. F. Midas, London, Britujo
157. F-ino M. E. Harris, Birmingham, Britujo  
 158. F-ino B. E. Morgan, Birmingham, Britujo  
 159. F-ino M. J. Hockey, Birmingham, Britujo  
 160. F-ino I. G. Robins, Birmingham, Britujo  
 161. S-ino C. H. Downes, Walkden, Britujo  
 162. F-ino N. Sutton, Stretford, Britujo
- Provizora Kongresprogramo**
- Sabato**  
 15.30 Kunsido de IEL Estraro kaj LKK.  
 20.15 Interkonatiga vespero en Kurŝaalo.
- Dimanĉo**  
 10.00 Solena malfermo de la Kongreso.  
 14.00 Esperanto-Diservo en la katedralo.  
 20.00 Kunsido de IEL Estraro.
- Lundo**  
 9.00 Fakaj kunsidoj.  
 10.00 Unua laborkunsido  
 14.30 Fakaj kunsidoj.  
 15.00 Kunsido de IEL komitato.  
 20.30 Esperanta teatraĵo.  
 Tuttaga ekskurso al Jaunpass.  
 Posttagmeze : Ekskurso al Schwarzee.
- Mardo**  
 9.00 Fakaj kunsidoj.  
 10.00 Dua laborkunsido.  
 14.00 Fakaj kunsidoj.  
 15.00 Kunsido de IEL komitato.  
 20.30 Esperanta teatraĵo.  
 Tuttaga ekskurso al Sustenpass.  
 Posttagmeze : Ekskurso al Corniche.  
 Ekskurso al Niesen.
- Merkredo**  
 9.00 Fakaj kunsidoj.  
 10.00 Tria laborkunsido.  
 20.30 Prelegvespero de Esperanto-verkistoj.  
 Tuttaga ekskurso al Jungfraujoch.  
 Posttagmeze : Ekskurso al Chasseral.
- Ĵaŭdo**  
 9.00 Fakaj kunsidoj.  
 10.00 Kvara laborkunsido.  
 15.00 Kunsido de IEL komitato.  
 20.30 Kongresbalo.  
 Ekskursoj tuttaga kaj duontaga.
- Vendredo**  
 9.00 Fakaj kunsidoj.  
 20.30 Koncerto en Alhambra.  
 Ekskursoj.
- Sabato**  
 Solena fermo de la Kongreso.  
 Ekskursoj.  
 Por la postkongresa semajno oni pretigas programon.

## ESPERANTO KAJ RADIO

Dimanĉo	17.40-17.45	Wien II (Aŭstrujo). 228.6m. Esperanto-programo.
	20.00-20.30	Praha (Ĉeĥoslovakujo). 49.92m. Politikaj, kulturaj kaj ekonomiaj informoj. Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII.
Lundo	11.30-11.40	PRG2 (Brazilo). 104m. Poresperanta parolado.
	15.10-15.30	Sveda Radio. 19.80m. Esperanto-programo. Sveda Esperanto-Instituto, Tegelbacken, Stockholm. Nur je la 16a de decembro.
	20.00-20.30	Praha. 49.92m. (kiel je dimanĉo).
	21.10-(?)	Warszawa III (Polujo). 49.06m. Politikaj informoj. Pola Radio, Warszawa, Koszykowa 8.
	21.50-22.00	Praha. 470.2m. Prelegoj, intervjuoj, teatraj scenetoj, kantoj kaj informoj pri la Esperanto-movado. Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII.
Mardo	01.00-01.30	Sveda Radio. 31.46m. kaj 49.46m. Ripeto de la lunda programo por ekster-Eŭropaj landoj. Nur je la 17a de decembro.
	18.50-19.00	Sofia (Bulgarujo). 32.9m. Prelegoj. Radio Sofia.
	20.00-20.30	Praha. 49.92m. (kiel je dimanĉo).
	21.50-22.00	Moravska Ostrava (Ĉeĥoslovakujo). 325.4m. Informoj. Radiostacio, Moravska Ostrava, Bráfova 5.
Merkredo	20.00-20.30	Praha. 49.92m. (kiel je dimanĉo).
Ĵaŭdo	05.35-05.45	Wien I (Aŭstrujo). 506.8m. Esperanto-programo.
	17.55	Bern (Svisujo). 47.28m. Federalismo kaj Paco. Paroladetoj de D-ro Privat. Societo Svisa de Radio-dissendo, Bern.
	20.00-20.30	Praha. 49.92m. (kiel je dimanĉo).
	21.50-22.00	Praha. 470.2m. (kiel je lundo).
Vendredo	18.50-19.00	Sofia. (Bulgarujo). 32.9m. Prelegoj. Radio Sofia.
	19.45-20.00	Hilversum (Nederlando). 415m. Esperanto-elsendo de la Nederlanda Kristana Radio-Asocio. N.C.R.V., afd. Omroep, Postbus 5, Hilversum. (Nur je la 20 de decembro).
	20.00-20.30	Praha. 49.92m. (kiel je dimanĉo).
	20.30-20.45	B.N.R.O. Kortrijk (Belgujo). 202.3m. Parolado. Zender Kortrijk van de B.N.R.O., Rijselstr. 36, Kortrijk.
	21.50-22.00	Moravska Ostrava. 325.4m. (kiel je mardo).
	Sabato	14.00-14.10(?)
15.25-15.40		Hilversum I. (Nederlando). 301m. Parolado. Radio-V.A.R.A., Postbus 175, Hilversum. (Nur je la 14a de decembro).
19.00-19.45(?)		PRA 2 (Brazilo). Paroladoj pri Esperanto. Ministerio por Edukado kaj Saneco, Praca da Republica, Rio de Janeiro.
20.00-20.30		Praha. 49.92m. (kiel je dimanĉo).
20.00-20.30		PRI 3 (Brazilo). 49.75m. Paroladoj pri Brazila vivo. "Brazila Kroniko", Radio Inconfidência, Belo Horizonte, Minas Gerais.

**Klarigoj**—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich, sed demanda signo post la horo signifas, ke ni ne havas precizan informon pri la horsistemo laŭ kiu oni kalkulas: por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Ni urĝe petas informon pri necesaj aliigoj. La donitaj adresoj estas tiuj al kiuj oni sendu gratulleterojn kaj informojn pri ricevado.

## DE LA FANTOMA VIDPUNKTO

Kiam la esplora komitato de la Instituto por Psika Scienco decidis aĝi pri la raporto, kiu alvenis, koncerne la hantadon de Belboro Domo, oni elektis min kiel esploranton.

La raporto estis iom sendifina. Nenio terura okazis por fortimigi la loĝantojn; nur kelkfoja odoro de mosko, kaj la apenaŭ aŭdebla kantetado de virino. Tamen la superstiĉaj vilaĝanoj ne volis servadi en la domo, kaj la domestrino ne ŝatis la urbegajn geservistojn.

Nu, je la aranĝita horo, mi kaj alia esploranto, kiu kunvenis por helpi min pri la prepara ekzameno de la hantejo, prezentis nin ĉe Belboro Domo—ne tre granda, sed iom beleta biendomo konstruita ŝajne ĉirkaŭ la mezo de la dekoka jarcento, sed alimaniere ne aparte interesa.

La domestrino akceptis nin, ĉar la familio estis for; kaj post temanĝo la bonulino montris al ni la ĉambron en kiu plej ofte okazadis la hantado.

Ĝi estis unuaetaĝa litĉambro kun du altaj fenestroj, el kiuj oni povis rigardi sur ĉarman malnovstilan ĝardenon, kun buksarabaj heĝoj kaj figuroj, zorge kaj lerte elfonditaj. Ĉe la muro, inter la du fenestroj, pendis antikva spegulo, kaj sub tiu staris tualetotablo samepoka, provizita per la simplaj tualetaĵoj de viro—raziloj, brosoj, ŝutiriloj kaj tiel plu.

Ankaŭ la meblaro de la ĉambro estis simpla; fera lito kun la kutimaj litajoj, ŝranko por vestoj, alia por ŝuoj kaj botoj, lavkuvo kun kranuoj por varma kaj malvarma akvo, granda ronda tablo kun libroj, skribtablo, du-tri komfortaspektaj brakseĝoj kaj aliaj detaloj tiaj, kiaj troviĝas en litĉambro de viro.

Ĉar la ronda tablo staris precize en la mezo de la ĉambro, sekvas ke ĝi lokiĝis ĝuste antaŭ la tualetotablo. Inter la ronda tablo kaj la Angle tipa, malferma kameno, sed iom pli proksime al la malantaŭa muro de la ĉambro, troviĝis brakseĝo tegita per ruĝa ledo kaj mole remburita kaj tiom invitata, ke mi decidis ĝin okupi dum mia *seanco*.

Mi tiel detale priskribas la aranĝon de la ĉambro, por ke la leganto povu kompreni, ke homo sidanta antaŭ la tualetotablo ne povus vidi en la spegulo iun kiu sidas en la brakseĝo, nek povus li vidi la sidanton mem sen ke li sin turnu rekte al li.

Post malpeza vespermanĝo kaj la foriro de mia kolego, mi denove esploris la ĉambron, legis la vesperan gazeton, primeditis dum kelke da tempo la trankvilan ĝardenon, elfumis pipon, kiu siavice trankviligis min, kaj tiam reatentis al la

hantata ĉambro dum mi atendis la alvenon de la fantomo, en la okazo, se ĝi decidus aperi.

Mi deziras klarigi, ke kaŭze de multaj spertoj pri similaj okazaĵoj, mi sentis nek eksciton nek alian fortan emociion, krom eble enuo; ĉar la granda plimulto de tiaj esploroj estis senrezultaj. De tempo al tempo eble venas petolaĉa spirito, tia kiam oni nomas *pollergeist*. Tamen tio estas alia afero.

Mi sidis en la elektita brakseĝo kaj sen tre streĉa atento legis libron aŭ rigardis en la fajron. Tamen fine mi konsciis, ke iu nerekonata parfumo invadis la ĉambron. Ĉar mi neniam antaŭe sentis la odoron de mosko (oni diris al mi, ke antaŭ kelke da jaroj la mosko malhavis sian odoron), mi ne povas diri, ĉu estis aŭ ne la odoro de mosko, kiu altiris mian atenton. Tamen la fenomeno pasis de mia menso, kiam mi konstatis, ke virino sidas tie, kie ankoraŭ staras la ronda tablo. Mi ne povis diri tiumomente, kaj mi ankoraŭ ne povas decidi, ĉu ŝi estas travidebla, aŭ ĉu estis la tablo, kiu travideblis, ĉar mi povis egale vidi la detalojn de ambaŭ. Se mi rigardadis ŝin dum kelke da tempo, la tablo ekmalaperis; kaj se mi fokusis mian atenton sur la tablon, la virino ŝajne malpli solidiĝis.

Mi devas klarigi, ke mi mem posedas ian malfortan psikan kapablon; tamen ŝajnis al mi en tiu tempo, kvazaŭ mi povas pasi de la normala en la tranĉan staton laŭvole. Tial ju pli mi mergis min en tranĉon, des pli mi povis vidi, kaj eĉ paroli kun la fantoma sinjorino.

Ŝi sidis en seĝo Jakobepoka, kiu certe ne estis en la ĉambro antaŭ ol ŝi aperis. (La tablo nun tute malaperis). Kaj ŝi rigardis sin en la spegulo kaj kantetadis iun forgesitan arion dum ŝi aranĝadis la harojn.

“Kial vi revenadas ĉi tien?” Mi proponis la demandon ne tute intence, sed kvazaŭ agis de ia senvola impulso. Efektive la tuta mallonga intervjuo ŝajne okazis dum mi estis en duonŝoĝo.

La sinjorino ne turnis sin al mi, sed respondis trankvile, kvazaŭ la demando estis tute natura: “Ĉar estante tre bela virino, mi pasigis multajn plezurigaĵajn horojn antaŭ ĉi tiu spegulo, kaj kiam mi ne devas esti aliloke aŭ fari ion alian, mi amas revenadi ĉi tien kaj revivi kelkajn el tiuj horoj. Ĉu vi mem ne faradas kelkfoje same?”

“Mi ne estas de via mondo,” mi respondis.

Kiel mi povus antaŭvidi la rezulton de tiu simpla kaj natura respondo? Mi atendis ricevi nur konvenan komenton kaj

poste daŭrigi mian intervjuon kun fantomo. Tamen jen kio okazis. Ŝi sin turnis al mi (ŝi ja estis treege bela virino!) kaj tuj ŝia trankvila vizaĝo transformiĝis je eksterordinara esprimo de—kiel mi priskribu ĝin?—ne ĝuste teruro, nek de naŭzo, sed ia miksaĵo de ambaŭ kun, samtempe, ekstrema konsterniĝo kaj malŝato. Ŝi metis la manon antaŭ la buŝon kaj ekkriis, “Vi estas ankoraŭ enkarne! Blankaj ostoj! Sango! Intestoj! Kia fiaĉaĵo!” kaj metante la manojn antaŭ la okulojn, ŝi ekmalaperis! Ĉu estas mirinde, ke la fantomoj malofte revenadas?

*C. Ashmore Baker, Anglujo*

### Skolta Jamboreo

La instruistoj de la kursoj organizitaj en Francujo por instrui Esperanton al la skoltoj, kiuj partoprenos en la proksima jamboreo, tre deziras havi skoltajn korespondantojn por siaj lernantoj. Oni skribu al S-ro Couteaux, 38 Rue Ernest Renan, Sèvres (S. et O.), Francujo.

### Al La Skoltoj de la Tuta Mondo

Skoltoj!

La nuna momento, kiu ne rifuzas elektrajn flugilojn al la volo de la homo,

trudas la uzadon de universala helpa lingvo flanke de ĉiu lingvo nacia!

Via misio, skoltoj, rafinite altruisma, estas dissemi bonon. Do per Esperanto la amplekso de viaj kapabloj atingos horizontojn ankoraŭ pli larĝajn kaj belajn!

Mi ne aludas pri la internaciaj kongresoj, en kiuj Esperanto estas altvalora trezoro, nek al la vizitoj inter tiel multaj diversnaciaj skoltoj, por kiuj Esperanto estis bona amiko; mi aludas pri la realaj servoj, kiujn la Esperantistaj skoltoj povos fari al la nacia turismo, kiam ĉiuj kapablos uzi Esperanton kun alilandaj Esperantistoj.

Hodiaŭ vi, skoltoj, estas tuta popolo! Vi ĉiam estas agopretaj kaj via energio sin direktas al plenumo de la Bono. Lau vi, estas perdita la tago, en kiu vi ne efektivigis bonajon! Do, la studota Esperanto proponas al vi multajn eblecojn por utiligo al viaj similuloj en la tuta mondo. Via devizo “Estu Preta” postulas, ke vi ankaŭ estu preparita por nacie kaj internacie helpi la homojn.

Ne hezitu, do, skoltoj, sed lernu Esperanton!

*S. Carreira, Portugalujo*

LA PLEJ BONA REKLAMILO EN ESPERANTUJO ESTAS

## ESPERANTO INTERNACIA

Eldonnumero: 7,000.

Legantoj en 65 landoj.

Formato ek de Januaro 1947: 25 × 18.5 cm.

REKLAM-TARIFO: £5 aŭ egalvaloro por tuta paĝo

Duon-paĝo 50 ŝilingoj

Kvaron-paĝo 25 ŝilingoj

Okon-paĝo 12.5 ŝilingoj

Anoncetoj pri korespondado k.t.p.: 2 pencoj por ĉiu vorto, aŭ 1 respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Teksto kaj pago devas atingi la oficejon (Heronsgate, Rickmansworth, Herts, Anglujo) antaŭ la 5a de la monato por la sekvonta numero.

# ANALIZADO DE LA TUTMONDA EKONOMIA STATO

(El Antaŭparolo de *Cosmos Man and Society* de Prof. D-ro E. B. SZEKÉLY)

La mekanikigado senĉese kreskas. La evoluo de la tekniko tendencas liberigi la homaron, sed nur en bone ordigita ekonomia kaj socia sistemo. Laŭ la nuna haosa sistemo malfeliĉege sekvas, ke (a) pli kaj pli da riĉaĵoj amasiĝas, sed (b) la pligrandiganta amaso da homoj tute ne povas konsumi ilin.

La vera kaŭzo de la nuna krizo\* estas nek la mekanikigado nek manko de varoj, sed la nuna haosa sistemo, bazita sur la neceso de la laboro (kiu havas laboron havas monon, kaj tial povas vivi), kiun la pligrandiganta amaso da homoj pli kaj pli malfacile povas havigi, pro tio, ke la mekanika laborado pli kaj pli anstataŭas la homan. Kaj tiel la senlaboreco pli, anstataŭ malpli, kreskas.

Tamen la mekanikigado estas ne nur neevitebla, sed ankaŭ nepre necesa por la evoluo de la homaro. Tial, ĉar la antaŭa stato neniam revenos, ni devas rezigni pri la senlaboreco. Do ni devas krei novan ekonomian kaj socian sistemon, bazitan sur konstanta senlaboreco, ĉar post nelonge la maŝinoj progresu, neeviteble kaj preskaŭ tute anstataŭas la homan laboradon.

Malgraŭ la nuna krizo kaj la senlaboreco, la homaro neniam estis tiel riĉa, kiel ĝi estas hodiaŭ, ĉar ĝi posedas ĉiam kreskantan abundon da ĉia amasigita riĉaĵo. Tial la krizo estas krizo de ĉiam kreskanta riĉeco kune kun ĉiam kreskanta nombro da senlaboruloj, kiuj ne povas kontentigi siajn individuajn bezonojn. Kial? Ĉu io mankas? Nenio, ja nenio! Ni havas ĉion por plenumi ĉiun homan bezonon; nur mankas laboro por ĉiuj. Tial sekvas, ke:—

- (a) La plej grava celo de la vivo ne estas la laboro (tio estas nur perilo), sed la kontentigo de ĉiu individua bezono.
- (b) Kiam homo ne povas havigi vivrimedojn per sia laboro, liaj naturaj bezonoj neniel modifiĝas. Tial
- (c) kontentigi siajn naturajn bezonojn estas fundamenta rajto de ĉiu homo; ĝi neniel dependas de aĝo, sekso, gento, nacieco, socia rango aŭ religio, kaj devus esti certigita por ĉiuj.

La socio, kiu posedas ĉiujn ĉi tiujn amasigitajn riĉaĵojn, devus disdoni ilin senpage al ĉiuj senlaboruloj, por kontentigi ties bezonojn (pri kiuj ili havas naturajn rajtojn). Tamen, kontraŭe, ankaŭ ili havas

devon al la socio—la devon produkti ĉiujn aĵojn por la kontentigo de la propraj individuaj bezonoj. Tiel ekaperas novaj konsekvencoj:

- (a) La produktado devus esti por la uzado, kaj ne por la profito.
- (b) La konsumado devus regi la produktadon, kaj ne inverse.
- (c) Sinteza ekonomia plano devus konstati la tutan kolektivitan sumon de ĉiuj individuaj bezonoj.
- (d) Neniu devus esti devigata laboradi je la produkto de varoj, kiujn li ne bezonas.
- (e) Neniu devus esti devigata labori pli longe ol necesas. Tial
- (f) neniu devus esti ekspluatata, ĉu kiel produktanto, ĉu kiel konsumanto, aŭ per nekompetenta organizado.

Ĉiu individuo havas rajton pri korpa, intelekta, kaj morala ŝirmado kontraŭ ĉiuspeca ekspluatado de homo per homo, kaj ankaŭ pri egalaj eblecoj por korpa, intelekta kaj morala disvolvigo. Tamen, ĉiu individuo cetere devas laboradi por kontentigi siajn bezonojn *proportio* laŭ tiuj bezonoj kaj konforme al kolektivaj postuloj.

Fine, ekster la tempo dediĉata al ĉi tiu laboro, ĉiu individuo devus trovi pasigis sian liberan tempon harmonie laŭ siaj naturaj emoj.

## La Rimedo

Konforme al la ampleksa karaktero de nia idealo pri la plej bona homa vivado, nia ĉielbonevivadanta komunumo, per feliĉa sintezo, unuigas la avantaĝojn de vidpunktoj nuntempe kontraŭstarantaj. Nia koncepto sukcesas akordigi la personan memstarecon tiel karan por la libereco de individuismo, kun la profitoj de la komune socia organizado. Ĝi kunligas la dezirindajn edukajn rezultojn de la individua produktado kun la krea riĉeco de la grandskala produktado bazita sur la dividado de la laboro. Ĝi plue permesas, ke la terkultura produktado ekzistu flanke de la industria, tute harmonie; unu el la grandaj malfacilaĵoj renkontataj en la nunaj unuflankaj sociaj formoj, estas la starigo de kontentigaj rilatoj inter ĉi tiuj.

Ĉiu individuo devus havi malgrandan terpecon, sufiĉan por ebligi produktadon de fruktoj, legomoj, grenoj, k.t.p., bezonataj por la propra konsumado. Ĉi tio signifas, ke la individuoj senpere produktu siajn proprajn manĝaĵojn. Tio konsekvencigas,

\* verkita en 1935: rim. de trad.

ke la homoj laboru subĉiele dum proksimume unu horo ĉiutage je okupoj, kiuj donas sanigan aktivecon sen tutlacigo, ĉar ĉi tiu minimuma *natura* ekzercigado necesas por la sano. La individua produktado de manĝaĵoj kaj vestoj, kune kun la plej simplaj specoj de mebloj, kompreneble multe influos la socion. Unue ĝi finfine kaj definitive certigos la individuan memstarecon. Ne eblas ekspluataĉi la gehomojn, kiuj havas la rimedojn por kontentigi siajn plej urgajn bezonojn. Ĝi garantias tiun personan liberecon, tiel altvaloran por la homaro. Ĝi fine detruos la servutecon, la sklavecon. Pro tio, ke ĉiu povos labori honorinde kaj fruktodone por si, neniu aŭ estos devigata proponi sin persone kiel serviston por siaj kunhomoj, aŭ povos postuli la servadon de la aliaj. Ĉi tio kaŭzos la plej grandajn rezultojn, ĉar tute neutilos amasigi riĉaĵojn ne ĝueblajn sen vasalaro el botelistoj, ĝardenistoj, ŝoforoj, k.t.p. Eĉ milionulo estus tuj devigata vivadi tiel same kiel la plej humila kamparano, se li ne povus trovi servistojn.

Tamen nur la ĉefe necesaj objektoj estus individue produktataj. Se la homa agado estus limigata je ĉi tiuj necese simplaj kaj elementaj taskoj, post nelonge la homaro malsupren falus ĝis la nivelo de la primitivaj societoj de la tropikoj.

La scienca progresado kaj ĝia teknika aplikado multe riĉigis la homan vivon, grandege plimultigante la nombron da eblaj travivaĵoj, kaj ankaŭ plibonigante ilian kvaliton, per la perfektigado de la sciencaj iloj, kiuj kvazaŭ dotis al la homaro novajn sentojn.

Tial ni tute malakceptas la simplistan idealon, kiu sendus nin reen ĝis la vivado de la Ĝardeno de Edeno. La sciencoj, kune kun la industriigo kiun ili estigas, estas ja altvalora akiraĵo—vere tiel altvalora, ke se ni devus elekti aŭ la nunan socion kun la scienco, aŭ la primitivan vivon sen la scienco, ni trovus la elekton tre embarasa, malgraŭ la teruraj kaj hontigaj neperfektaĵoj de la nuna socio. Feliĉe ĉi tiu tiel kruda dilemo ne staras antaŭ ni, kaj ni kredas, ke eblas konstrui socion, kiu konservos la altvalorajn venkojn de la homaj energio kaj inteligenteco, kaj ankaŭ liveros la homaron el la danĝeroj, al kiuj niaj malordaj sociaj formoj almetas kaj la sanon de la korpo kaj la noblecon de la spirito.

*Trad. kun permeso de la aŭtoro  
H. P. Devenish, Kanado*

Por eviti interrompon en la ricevo  
de la gazeto pagu la kotizon  
senprokraste!

## La Dudeka Jaro

En la 1a de Aŭgusto 1946 la Esperantistaj amikoj de la Biblio festis la 20an datrevenon de la ekzisto de tiu eminenta verko en nia lingvo, ĉar ĝi estis solene kaj publike dediĉita en Diservo en la Katedralo de S-ta Giles, en Edinburgh, en la 1a de Aŭgusto 1926.

Mi ne scias, kiom da ekzempleroj ĝis nun estas venditaĵ. La solan informon pri tio mi legis en *Enciklopedio de Esperanto* sed ĝi estas tre malnova. Laŭ tiu informo, ĝis la 31a de Decembro 1931 (antaŭ 15 jaroj!) estis venditaĵ: Biblio kompletaj, 5444; Novaj Testamentoj, kompletaj, 22,727; Evangelioj kaj Psalmaro (aparte eldonitaj), 14,231. El tiuj ciferoj ni konstatas, ke tiam jam estis venditaĵ 42,402 ekzempleroj de la Evangelioj. Tio certe ĝojigas la Kristanajn Esperantistojn. La Evangelioj estas la plej konata parto de nia literaturo en Esperanto. Ja neniu alia literatura libro en Esperanto atingis ĝis 1931 tian nombron.

El religia vidpunkto la Biblio en Esperanto havas tute specialan signifon: ĝi estas la unua eldono komunehoma, apartenanta al neniu aparta nacio, raso, eklezio, mondparto. Esperanto apartenas egalrajte al ĉiuj filoj de Dio, same kiel la Sankta Skribo.

Mi ĝojas, ke en la 20a jaro post la apero de la Biblio, mi povis ricevi 104 ekzemplerojn de tiu libro. Mi ja ricevis 100 el la Biblia Societo kaj 4 pere de I.E.L.; sed mi bedaŭras, ke la malkara eldono nun ne ekzistas, ĉar nur per ĝi ni povas venigi la Libron en ĉiujn Esperantistajn hejmojn. La ekzemplerojn de mi ricevitaĵ oni povas uzi preskaŭ nur por donacoj, ĉar ilia prezo estas alta por la malriĉaj klasoj. Nu, donacita libro plej ofte restas netuŝita en ŝranko, kaj nur aĉetita estas legata; ĉar kiu deziras legi libron, ĝin aĉetas.

Ĉu mi rajtas per ĉi tiu artikolo peti la Direktorojn de la Brita kaj Alilanda Biblia Societo, ke ili helpu nin per la malkara, propaganda eldono?

Ĉu Esperantisto, kiu atente pensos pri la graveco de la Biblio kiel unueciga forto por nia lingvo, certe volos fari la saman peton. Ĝi estas la plej granda verko de D-ro Zamenhof, la plej zorge presita, la sola tradukita en ĉiujn aliajn lingvojn kaj plej facile komparebla pro la numeroj de la paraĝrafoj.

*I. G. B., Brazilo*

(Noto de la Redaktoro: Eble ne estas ĝenerale sciata, ke la malkara eldono de la Biblio en Esperanto estis ebligata nur per tre malavara donaco fare de anonima bonfaranto).



# ENIGMA KONKURSO N-ro 10

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 106 rue Général Lotz, Brussel-Uccle, Belgujo

## Solvoj de la enigmoj el la konkurso N-ro 8

**N-ro 19:** Vi sekretos al edzino, ŝi sekretos al fratino, kaj tiel la sekreto promenadas sen fino.

**N-ro 20:** La sinsekvo de la adjektivoj estas: 11 - 8 - 27 - 14 - 6 - 13 - 25 - 9 - 16 - 3 - 5 - 21 - 22 - 4 - 26 - 15 - 7 - 18 - 10 - 19 - 17 - 28 - 1 - 12 - 20 - 23 - 2 - 24.

Gajnis la premiojn post la sesa konkurso: S-ro L. Paeleman (Belg.) kaj F-ino J. J. v. Thiel (Ned.) kun 78,5 p. kaj S-ro E. B.

Jörgensen (Dan.) kun 76 p. Al ĉiuj tri mi sendis la libroliston el kiu ili mem povas elekti sian premion. Post ili sekvas: S-ro E. Maynar (Hispan.) 75,5 p. S-ro T. K. Slade (Brit.) kaj S-ro I. Ekström (Finl.) 75 p. S-ino N. Koudijs-Modoo (Ned.) kaj S-ro P. Kustaanheimo (Finl.) 74,5 p. S-ro B. S. Trier (Dan.) 73 p. F-ino E. Jayet (Svis.) 65 p. S-ro P. Schwerin (Aŭstralio) 64 p. S-ro W. P. Roelofs (Ned.) 63,5 p. S-ro M. Retôt (Franc.) kaj S-ro G. Rust (Brit.) 62 p.

## Enigmo N-ro 23

### ĈEVALIRA ENIGMO

am sig  
Jen se  
la la ni noj,  
co mas, es kaj  
ci tas mas en ne per  
nin se ti ĝan gas flan ci kaj  
Ĝas, i Nek la to jon taj ki  
kaj Ni ne te mi ki la ne pa ĝe  
ta. Pri l' Ni ba ru moĵ, vo fan ce nok es la  
ti tem ras. toĵ ras Ĝi mon ni gra di tan, kaj li ra po kaj  
di del' bo es koj pan ho te Ĉar kon ra gran l' es ta tar ku  
lek poĵ tas, mo te, Ĝas la ta ton fi ni tre bo kaj mal pe ten no  
Ĝi sor Tra mil per mo del' fra moĵ, stan kla da, men ga ro, rek Eĉ te,  
e es la nek se kon den di kan ho jo, hof. la ad vi en to ro, co sti  
ton to, mas se moĵ su! te stan Tra mal nas, moĵ ko La Za lon A glo gu rek  
ton voĵ se Ni per te. mas sa la ĉe mo Vo mo do La gos lon post l' ob Ni  
rek san Al moĵ kaj ĉi Ĝas, ĉe su, lu en nos, Ne bri ro ce pa ro. tin ce post Nur  
taj la Cent e di Ho. se ta lo poĵ ne le al be vi Lu za la ci ŝo, te pa  
di te. lo, pen ni  
nok ste vin Ŝe  
ĉe ne le tas  
Si en!  
La su! la mi  
ni en ni taŭ ras, ne ce ki  
Ĝe al nas: ku Al sti  
kor' so ra i an Ob u lo,

Per la ĉevalirado el la ŝakludo vi povas legi en tiu ĉi figuro :

- (a) La titolon de tre konata poemo,  
 (b) Tri strofojn de tiu poemo,  
 (c) La nomon de la aŭtoro de la poemo.

Se vi kunigas la centrojn de la kvadratoj laŭ la sinsekvo de la ĉevalirado per rektaj linioj, kaj la lastan centron kun la unua, vi ekhavas belan tute simetrian figuron. Komenca silabo substrekitas.

### Enigmo N-ro 24

Iu ricevas en banko 25 tute novajn monerojn de la sama speco. Li metas ilin en sian poŝon sed forĝesas, ke en tiu poŝo troviĝas jam ekzemplero de la sama speco, ankaŭ tute nova, sed . . . falsa. Ekstere neniu malsameco estas rimarkebla, li nur scias, ke la falsa ekzemplero pezas treege malmulte malpli ol la aliaj moneroj. Feliĉe li posedas bonan pesilon sen peziloj. Kiom ofte li nepre devos pesi por certe scii, kiu estas la falsa monero? Nur respondoj kun argumentado valoras.

5 poentoj.

## MIA TRAJNO, PRAVE, MALPRAVE

*Nordokcidente de Londono du fervojoj—Metropolitan kaj Bakerloo (subtera fervojo) kuras unu flanke de la alia dum kelke da mejloj antaŭ ol ili apartiĝas sekve de la entuneliĝo de la lastnomita. Ĉi tiu estas la sceno de la sekvanta alegorio.*

La du trajnoj ekiras el la stacidomo de kontraŭaj flankoj de la sama perono kaj veturas flankon ĉe flanko. Ni estis en la malgranda Bakerloo; tiu apud ni estis la granda Metropolitan, kiu iom gigantis kontraŭ ni. La homoj en la pli alta vagono rigardis malsupren al ni kun malmulta intereso kaj ni reciprokis senatente.

Tiumomente, mi supozas, la du veturigistoj ekrigardis unu la alian, kaŝe.

“Ĉu tiuj en tiu liliputa trajno opinias, ke ili povas konkuri kontraŭ mi? Mi tuj montros al ili, kiu estas la plej potenca!” Kaj la veturigisto de la Metropolitan turnas la funkciigilon. La granda trajno komencis antaŭenrapidi kaj preteriri nin. Tiam io notinda okazis. La homoj en la pli alta vagono apud ni ekinteresiĝis, kaj ni sentis same. La ŝanĝo estis evidenta. Ili estis ĝojaĉantaj je ni! Unue per eta rideto, poste per tutvizaĝa rideto kaj baldaŭ per taŭzanta rido! Jen unu granda vagono preterpasis kaj jen alia. Aro da infanoj fingromontris al ni, kvazaŭ insulteme.

Estis mirinda psikologia ŝanĝo, kiu okazis en unu momento. La homoj en tiu trajno unuigiĝis, nur pro tio, ke ili estis hazarde kunaj en la trajno, kaj estis venkantaj. Same unuigiĝis la homoj en nia trajno, sed tio estis kaŭze de tio, ke ni estis malvenkantaj. Ni fariĝis NI kaj ili fariĝis ILI kaj, pli ol tio, fremduloj. Ni ĵaluzis unu kontraŭ la alia, ni estis apartaĵoj, suspekto rigardantaj al ni reciproke. Tamen ĉio kio efektive okazis estis nur, ke ni veturis, tute hazarde en malsamaj trajnoj, kaj pro tio fariĝis senbaze artefaritaj unuigoj. Ni estis Londono kaj Manchestero. Ni estis Lankaŝiro kaj Jorkŝiro. Ni estis Kimrujo kaj Anglujo. Ni estis Anglujo kaj Germanujo. Ni estis Germanujo kaj Rusujo. Ni estis Ameriko kaj Japanujo.

La veturigisto de la malgranda trajno transŝovis sian funkciigilon kaj niaj vagonoj subite antaŭenrapidis. La ridetoj malaperis de la vizaĝoj de la homoj en la granda trajno. Ni atingas ilin! Ni antaŭeniris flankon ĉe flanko malestime rigardante al ni reciproke. Ni ridetis je ilia malkontento; ni ridetaĉis triumfe kaj spite, kiam nia trajno efektive atingis ilian—nia trajno estis venkanta! Ni kunigis nin kun ĝia sukceso kvazaŭ ni estus respondataj pri tio. Post ĉio, estis bone aparteni al tiu malgranda trajno kaj ne al tiu grandega maleleganta aĵo, kiu jam postlasigis malantaŭ ni. Kiam ni preterpasis la veturigiston ni volis grimaci al li, sed kiel iu, kiu volas kaŝe venki alian, li intence rigardis alidirekten.

Tiam subite ni malsupreniris, for de la granda trajno, for de la sunbrilo kaj la blua ĉielo, for de la somera varmo—subteren. Kaj tie ni forĝesis pri la granda trajno; ĉar post ĉio, kiom gravas tiaj aferoj, kiam oni enteriĝas?

*Pastro Frank E Quicke. Tradukita, kun permeso de The Christian World (La Kristana Mondo), de R. Robertson, Anglujo*

## ŜAKO

La Esperanto-fako de ICCA (Internacia korespondŝaka ligo) jam starigis kvaran grupon de sia korespondturniro. En ĉiuj kvar grupoj ludas sume 28 ŝakistoj el 11 landoj (Ĉeĥoslovakujo 7, Anglujo, Nederlando, Svedujo po 4, Danujo 3, Egiptujo, Finnujo, Norvegujo, Polujo, Sud-Afriko kaj Svisujo po 1). Jam alvenis kelkaj aliĝoj por 5a kaj 6a grupoj. Tiuj grupoj komenciĝos tuj kiam aliĝos por ĉiu grupo 7 ŝakistoj el minimume 6 landoj. Aliĝojn akceptas turnirgvidanto, D-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakujo.

# INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Centra Oficejo : Herongate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

N-ro 188

OFICIALA INFORMILO

2an Novembro, 1946

## NOVA KOMITATANO

S-ro L. E. Pfahl, 64 Brighton St.,  
Croydon, N.S.W., Aŭstralio.

## INTERKONSENTO PRI KUNLABORO

Konforme al Art. 14 de la Statuto la  
Komitato faris Interkonsenton pri Kun-  
laboro kun Universala Ligo, Riouwstraat  
172, Den Haag, Nederlando.

## NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

T. Crawford, Los Angeles, Calif., Usono.  
H. J. Howard, Wraysbury, Anglujo.

## NOVAJ DELEGITOJ

### Aŭstralio

**Alice Springs.** D: Stanley W. Hicks,  
Alice Springs, Centra Aŭstralio.

### Aŭstrujo

**Ebensee.** D: F. Weisskirchner, Marktg. 1.  
Tel: 49.

**Ried i. I.** D: H. Jungschafter, Bayr-  
hammergasse 3.

**St. Pölten.** D: H. Halik, A. Hackerstrasse  
63, St. Pölten-Spratzern.

**Steyr.** VD: S. Szabo, Werndl-gasse 12.

### Britujo

**Bromley.** D: S. Bellatti, 40 Station  
Approach, Hayes, Bromley, Kent. Tel:  
Hurstway 1292.

FD (Abelkulturo): La D.

**Erith.** D: P. Ball, 17 Oakdene Avenue.  
Tel: 2181.

**London.** FD (Meteorologiaj Instrumentoj):  
E. J. Spence, 20 Carnanton Road,  
London, E.17. Tel: LAR 3371.

### Ĉeĥoslovakujo

**Karlovy Vary.** D: A. Pilař, Okružní cesta  
8-IV.

FD (Komerco): J. Jermář, c/o Kotva,  
Trída marš. Končva 1.

**Pardubice.** D: A. Jandik, Husova 87.  
Tel: 2646.

**Praha.** FD (Ĝardenkulturo; florkomerco):  
L. Kynčl, Praha VIII, Palmovka.

**Prostějov.** D: S. Jeřábek, Namesti Dra E.  
Beneše 9. Tel: 115.

**St. Město.** D: J. Pařisek, Staré Město pod  
Sněžníkem. Tel: 12.

### Finnlando

**Helsinki.** FD (Ĵurnalismo): Y. Kuorikoski,  
Pohjoisranta 20 C 51.

## Hispanujo

**Manresa.** D: A. Lobet Cornet, Plaza de  
les Mártires 20.

VD: A. Servet Martí, C. Nueva de  
Valldaura 34-3.

## Hungarujo

**Remetekertváros.** D: G. Némethy, Pest-  
hidegkut 2, Mátyás kir. ut 11/B.

**Sátoraljaújhely.** VD: D-ro Farkas Dénes,  
Sátoraljaújhely, piaristák.

## Islando

**Sigluftjörður.** D: J. P. Thorsteinsson,  
Túngötu 38.

## Jugoslavujo

**Koprivnica.** D: A. Nemeč, Starogradska 4.

**Vrboska.** D: T. Havana, Vrboska-Hvar,  
Dalmacio.

## Kenjo

**Nairobi.** D: R. W. Rayner, Scott Agri-  
cultural Laboratories, Box 338. Tel:  
2464.

FD (Agrikulturo; Botanio): La D.

## Maroko

**Rabat.** D: Miguel Dôdô, Les Moulins  
Baruk D.

FD (Librotenado): La D.

## Nederlando

**Dordrecht.** FD (Asekuro): A. de Visser,  
Oudehovenstr. 6. Tel: 5707-3526.

FD (Komerco; Konstrumaterialo): C.  
Nelson, v. Slingelandtlaan 30. Tel:  
3441.

**Goes.** D: K. Bareman, Postbus No. 1,  
Goes (Z).

**Krommenie.** D: Al Mantjes, Eikelaan 17.

**Landsmeer.** D: L. Sj. Swart, v. Beek-  
straat 130.

**Rotterdam.** FD (Fervojoj): P. E. van  
Hengel, Pleinweg 37 b.

**Santpoort.** D: C. Oderkerk, Terrasweg 68,  
Santpoort (dorp).

## Norvegujo

**Halden.** FD (Juro): A. Falch, G. Stangsgt.  
6. Tel: 1911.

## Polujo

**Biala-Bielsko.** D: Mgr. St. Horthyński, Ul.  
11 Listopada 74. Tel: 16-32.

**Krakovo.** D: Prof. M. Sygnarski, Sloneczna  
4 m. 23.

**Lodz.** FD (Kuracado): D-ro J. Pensen, ul. Pietrkowska 56 m. 8. Tel: 260-49.  
**Pabianice a. Lodz.** D: S-ino J. Godlewska, ul. Kosciuszki 8 m. 19.

**Sud-Afriko**

**Pretoria.** FD (Polico; Hundodresado): T. C. Hawley, Box 449. Tel: 2-2091.

**Svedujo**

**Visby.** D: A. Malmkvist, Södra Hanségatan 20. Tel: 1306.  
 VD: Sven G. Samelius, A.-B. Hampberedning. Tel: 104.

**Svisujo**

**Starrkirch.** D: Rudolf Zumstein, Starrkirch bei Olten.  
 FD (Fervojoj): La D.

**ŜANĜOJ****Britujo**

**Keynsham.** D: nova adreso: 35 Charlton Road. Tel: 3284.  
**London.** FD (Elektro-tekniko): vakas.  
**Sutton** (Surrey). La ĝusta adreso de la D estas 140 Mulgrave Road.  
**West Wickham.** D kaj FD: vakas.

**Ĉeĥoslovakujo**

**Praha.** FD (Komerco): vakas.

**Francojo**

**Grenoble.** D: nova adreso: "Mia Konko", Rue de la Bajatière.

**Nederlando**

**St. Annaparochie.** D: vakas.  
**Groningen.** FD (Fervojoj): vakas.

**Svisujo**

**Liestal.** D kaj FD: vakas.

**MEMBRO-SUBTENANTOJ**

250. S-ro H. Michálek, Liberec, Ĉeĥoslovakujo.  
 251. S-ro J. Korinek, Brno, Ĉeĥoslovakujo.  
 252. S-ro R. Rambaud, Paris, Francojo.  
 253. S-ino M. Vidal, Paris, Francojo.

**PATRONOJ 1947**

1. D-ro F. J. Williams, Melbourne, Aŭstralio  
 2. S-ro G. van der Lijn, Uccle, Belgujo.  
 3. S-ro T. J. Gueritte, Surbiton, Anglujo.

**MEMBRO-SUBTENANTOJ 1947**

1. S-ro B. P. Blöndal, Hvammstanga, Islando.  
 2. S-ro M. Stuttard, Amersham, Anglujo.  
 3. S-ro G. H. Parker, London, Anglujo.  
 4. S-ro R. Robertson, London, Anglujo.  
 5. Prof. L. Apcher, Meknes, Maroko.  
 6. S-ro J. Saldanha Carreira, Lisboa, Portugalujo.  
 7. F-ino A. Fotherby, Surbiton, Anglujo.

**DONACOJ.** H. Davies, Jnr., 20ŝ., H. P. Saunders 2ŝ. 3p.

**DONACOJ** por helpi al la kosto de la Petskribo. F-ino A. B. Edwards 10ŝ., L. F. Hunter 20ŝ., E. L. 10p., H. Jacks 3ŝ. 6p.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

**STATISTIKO**

Ĝen la stato de la membraro je la fino de Oktobro, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de Oktobro 1945:

	1945	1946
Asociaj Membroj ..	3655	7568
Individuaj Membroj:		
MJ .. .. .	990	1127
MA .. .. .	2173	4245
MS .. .. .	157	255
Patronoj .. ..	24	24
DM .. .. .	80	102
HM .. .. .	16	21
	3440	5774
	7095	13342

CECIL C. GOLDSMITH, *Sekretario*

**NASKIĜOJ**

**Ĉeznaev**—Je 5a Novembro al Ge-sroj Ivan Ĉeznaev, Sliven, Bulgarujo, filino, Dejana.

**Hortynski**—Al Ge-sroj Hortynski, en Biala, Polujo, je la 17a Septembro, filineto Malgorzata Dorota.

**Kühlmann**—Je 7a Aŭgusto al Ge-sroj Bodil kaj Gustav Kühlmann, VD de IEL, Pr. Jørgensgade 4 A II, Kopenhavn, Danujo, filino nomita Lizeta.

**Pleskaczynski**—Je la 29a Oktobro al Ge-sroj T. Pleskaczynski en Warszawa, Polujo, filo nomita Kristofo.

**Sturmer**—Je la 19a Novembro al Ge-sroj K. R. C. Sturmer en Elm Park, Essex, Anglujo, filo Edward Achille.

**MORTO**

**Laven**—Je 13a Oktobro mortis S-ro Bernhard Lavén, delegito en Örebro, Svedujo, kiu dum multaj jaroj bone laboris por la Movado.

**RIDO SANIGAS**

Bona kolekto de anekdotoj  
 9 pencoj aŭ 3 rpk. afrankite  
 Mendu ĉe IEL

# I.E.L. KOTIZOJ 1947

laŭ la kurzoj je 1 Okt., 1946

Lando	MJ	MA	MS	Patr.	E.I. abono	Valuto
Argentino ..	3	8	20	80	6	pesoj
Aŭstralio ..	4	10	20	100	7/6	angl. ŝil.
Aŭstrujo ..	8	20	40	200	15	sch.
Belgujo ..	40	100	200	1000	75	fr.
Brazilo ..	16	40	100	400	30	kru.
Britujo ..	14*	20*	35*	110*	7/6	ŝil.
Bulgarujo ..	—	500	—	5000	—	levoj
Ĉeĥoslovakujo ..	40	100	200	1000	75	kĉs.
Danujo ..	4	10	25	100	7	kr.
Egiptujo ..	4	10	20	100	7/6	angl. ŝil.
Finnlando ..	110	275	600	2750	200	fmk.
Francujo ..	100	240	500	2400	150	fr.
Hindujo ..	4	10	20	100	7.5	angl. ŝil.
Hispanujo ..	10	22	45	220	15	pes.
Hungarujo ..	10	24	48	240	16	for.
Irlando ..	4	10	25	100	7/6	ŝil.
Islando ..	4	10	20	190	7.5	angl. ŝil.
Italujo ..	180	450	900	4500	300	lir.
Jugoslavujo ..	40	100	200	1000	75	din.
Kanado ..	1	2.5	5	25	1.75	dol.
Maroko ..	100	240	500	2400	150	fr.
Nederlando ..	2.5	5.5	11	55	3.5	fl.
Norvegujo ..	4	10	25	100	7	kr.
Nov-Zelando ..	4	10	20	100	7/6	angl. ŝil.
Palestino ..	200	500	1000	5000	350	mil.
Polujo ..	100	250	400	2500	200	zl.
Portugalujo ..	20	50	100	500	40	esk.
Sud-Afriko ..	4	10	20	100	7/6	angl. ŝil.
Svedujo ..	3.5	9	18	90	6.5	kr.
Svisujo ..	4	10	20	100	7	fr.
Turkujo ..	200	500	1000	5000	350	pias.
Urugvajo ..	2	4	9	40	2.5	pes.
Usono ..	1	2.5	5	25	1.75	dol.
Aliaj landoj ..	4	10	20	100	7.5	angl. ŝil.

\* enhavas la kotizon al B.E.A.

Pagu vian kotizon frue al la kutima pagejo : tio multe helpos al ni kaj evitos interrompon en la livero de la gazeto al vi.

LIBRO EL ĈINUJO

# ELEKTITAJ NOVELOJ

de  
LU SIN

Broŝurita 140 pagoj.

Prezo 3 ŝil., afranko 3p. (13 rpk.)

*Mendu ĉe*

**INTERNACIA ESPERANTO-LIGO**  
Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo

# ESPERANTA LEGOLIBRO

VILHO SETÄLÄ

Bindita 112 paĝoj.

Prezo 2 ŝil., afranko 4p. (9 rpk.)

*Mendu ĉe*

**INTERNACIA ESPERANTO-LIGO**  
Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo

## Internacia Asocio de Postmark-Kolektantoj

### INTEKS

(Internacia Interŝanĝo)

Post multa esplorado la Estraro de I.A.P.K. kredas, ke ĝi planis la perfektan interŝanĝ-sistemon por filatelistoj. Spaco ne permesas detalan klarigon, sed jen la ĉefaj karakterizaj:

- (1) Oni ŝanĝas ĉiujn kontribuojn.
- (2) Oni neniam perdas pro mal-honesteco.
- (3) Oni povas starigi landan rondon kaj ricevi pogranda interŝanĝon.
- (4) La plano estas mondampleksa.

La ĉefaj kondiĉoj estas:—

- (a) Oni devas esti membro de I.A.P.K.
- (b) La kontribuoj devas esti aprobitaj de la Sekretario rilate prezon kaj kvaliton.
- (c) Oni unue havigu la unuan kajeron de la Sekretario, por poste ricevi ceteran kvar; plenkredite tiujn, oni ricevas krediton, kiun oni povos uzi por "aĉetado" el kajeroj poste sendataj.
- (d) Oni pagas al la Asocio 10% de la interŝanĝvaloro per freŝaj pm. de sia lando. Oni debetas la koston de la kajeroj kontraŭ la kredito de la membro.

Ĉiuj detaloj haveblaj de la Sekretario, Pastro A. S. Thomson, 5 Albion Street, Southwick, Sussex, Anglujo, kontraŭ freŝa poŝmarko de via lando ĝis valoro de afranko de simpla letero.